

Ĉu vi ankoraŭ ne aliĝis?

Jam malfermiĝis la retpaĝo, jam okazis granda varbkampanjo kaj jam pasis aliĝperiodo. Se vi prenas vin mem serioze, nepre ne maltrafu la tre baldaŭ finiĝantan duan aliĝperiodon, je la **3-a de januaro**, kaj aliĝu al la **Internacia Junulara Kongreso en Someren, Nederlando**.

La temo de la 76-a IJK estos 'Toleremo, ĉu senlima?', aŭ pli taŭge 'seksumado, drogoj kaj rokmuziko'. Ni esploros drogpolitikon de Nederlando kaj aliaj landoj, diskutos nian propran verdan festkulturon, kaj multe parolos pri migrantoj kaj rifuĝantoj.

Ankaŭ la tradiciaj amuzaĵoj kiel danckursoj, naĝejo, koncertoj kaj komitatkunsido kompreneble ne mankos.




Mankas en tiu ĉi bildo: vi

La unika junulargastejo

De Hoof ofertas ĉiujn necesajn kondiĉojn por sukcesa IJK: diversaj programejoj ene kaj ekstere, taŭgaj manĝejoj kaj komfortaj ĉambroj. Ĝia unika trinkejo estas perfekte izolita por festi ĝis la nokto-, noktofino. Kaj se vi volas ial eliri la kongresejon, estos promenaj, biciklaj kaj busaj ekskursoj al naturo kaj urboj.

La organiza teamo celas organizi kongreson alireblan por ĉiuj. Programkotizoj estas ekde €15 por la malplej pagipovaj, memzorgi facile eblas, kaj ekzistas eĉ diversaj rabatoj por volontuloj kaj kontribuantoj. Krome estos karavanoj el ses direktoj por ankaŭ alveni malmultekoste kaj bonetose.

Trovu aliĝilon, kongresejon, karavanojn kaj diversajn utilajn konsilojn ĉe ijk2020.tejo.org!



Pos-Amiko

Vintro 2019, numero 31

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Spamfiltrilo tro efikas en komitato
2. JES-organizantoj bedaŭras pri malfacila alveno
2. Britoj voĉdonas por eviti esperantistojn
2. Koko Poso forkaptita
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj
3. Kara Koko
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Spamfiltrilo tro efikas en komitato

La retroŝtlisto de la komitato de TEJO, kutime tre aktiva, precipe antaŭ komitatkunsidoj, tute silentiĝis dum unu semajno en decembro. Ĉu finfine la lasta vorto estas dirita? Ĉu ĉiuj komitatanoj estis festantaj kun familio, for de komputiloj? Ne, la silenton kaŭzis pli teĥnika okazaĵo.

Antaŭe mesaĝoj de Civit-anoj kaj Grezijono ĝenis iujn komitatanojn, kiuj konsideris ilin 'spamo'. Responde oficisto de TEJO respondeca pri komunikado ŝanĝis la agordojn de la spamfiltrilo de la komitata retlisto. Sed tio rezultis je blokado de ĉiu retroŝtmesaĝo. La Pos-Amiko petis klarigon de TEJO-oficisto:

Poso: "Kiam vi rimarkis, ke mesaĝoj estas maltaŭge blokataj?"

M.: "Nur alveninte al JES. Homoj citis mesaĝojn, kiujn aliaj ne vidis. Fakte jam estis plendoj pri tio en TEJO Telegramo, sed kiel mense sana homo mi jam antaŭlonge silentigis tiun grupon."

Poso: "Sed kial la filtrilsoftvaro misrekonis mesaĝojn?"

M.: "Mi faris kelkajn testojn, kaj mia nuna teorio estas, ke mesaĝoj de iuj komitatanoj enhavas tiom da ripetitaj argumentoj kaj manko de kohero, ke ne eblas distingi ilin de tipa verda spamo."

Poso: "Do ĉu la afero estas nun solvita?"

M.: "Mi antaŭ kelkaj tagoj aplikis la saman spamfiltron al la telegramgrupo, kaj nun mi almenaŭ ne plu ricevas plendojn."

JES-organizantoj bedaŭras pri malfacila alveno de partoprenantoj

Ne estis plej facile alveni al la 11-a Junulara E-Semajno en Karłów. La loko troviĝas sufiĉe oriente, alte en la montaro, kun apenaŭ iu publika transporto (des malpli ĉirkaŭ ferioj). Kiam finfine alvenis la unuaj partoprenantoj je la komenco de la vespero, klare videblis la zorgemo en la vizaĝoj de la organiza teamo.

Teamano T. konfesas: “Ni fakte esperis, ke neniuj sukcesos trovi la kongresejon. Ni simple volis havi trankvilan vesperon kun amikoj, sen la ĉiujara organizstreso. Tial ni elektis malproksiman lokon, kun polaj signoj en la nomo, sen transportebloj. Sed iel tiuj fekdamnaj esperantistoj ĉiam trovas iun vojon.”

Laŭ nekonfirmitaj onidiroj la sekva JES okazos en Bielefeld, alia netrovebla loko.

IJK-retpaĝo havebla en pli da lingvoj ol iam ajn antaŭe

“Eĉ en la artefarita lingvo Esperanto.”

Britoj voĉdonas por Briteliro por eviti esperantistojn

Mallonge post la anonco de la TEJO-estraro, ke la nura kandidato por IJK 2021 estas Britujo, la britaj voĉdonantoj amase voĉdonis por la konservema partio, kiu volas elpreni la landon el la Eŭropa Unio. La espero estas, ke tiel la lando povos pli facile regi enirojn en la landon, por pli facile forbari strangajn esperantistojn.

Koko Poso forkaptita al ĉarmega, vizitinda lando

Dum neatentita momento je la fino de la Klaĉ-Kunveno Post-Somera en Bodegraven iu tre afabla persono de nespecifita genro kaj deveno forkaptis min kaj prenis min for ne nur de miaj kutimaj kunloĝantoj, sed eĉ for al alia lando!

Nepre indas menciigi, ke dum la forkapto vojaĝo mi fartis tute agrable kaj en neniuj momento estis tenata en iu ridinde malgranda dorsosako. Post tiu ĝuinda vojaĝo mi alvenis al Danio, lando kun tute normala kaj komprenebla lingvo kaj varmkoraj homoj, en kiu okazos la sekva Klaĉ-Kunveno Post-Somera. Mi apenaŭ povas atendi ĝis la 31-a de oktobro 2020, kiam ĝi okazos en Ravnsøhytten en Ry, kaj ne nur ĉar post tio mi rajtos reveni al Nederlando.

NEJ-Novaĵoj!

Nova NEJ-estraro:

- Prezidanto: Spenĉjo
- Sekretario: Robin
- Kasisto: Roĉjo
- Estrarano: Agata
- Estrarano: Joost



KKPS estis peza laboro ne nur por la estraranoj

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ŝparu la medion, ne flugu pli ol dufoje tage.

Taŭro: Se ekkantus via kato, tio estus kata strofo. Se vi, katastrofo.

Ĝemeloj: Ju pli da novjaraj celoj vi havas, des pli verŝajnas sukcesi almenaŭ unu.

Kankro: Kiu vojaĝas en bona karavano, tiu neniam tro malfrue alvenos.

Leono: Vi renkontos strangulojn, kiuj evidentiĝas esti viaj familianoj.

Virgulino: Post malfrua briteliro vi ne plu estos.

Pesilo: Januaro estas astrologie bona monato por aliĝi al TEJO kaj IJK.

Skorpio: Via horoskopo kaptiĝis en spamfiltrilo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Mia: Traktu ĝentile ĉiujn bestojn, specife birdojn.

Sagitario: Se neniu alia povas helpi vin, vi ĉiam povas sendi leteron al Kara koko.

Kaprikorno: Se vi enuas, vi ĉiam povas legi la komitatan liston.

Akvisto: Vi malkovros, ke pli altas Szczeliniec ol Szczecin.

Fiŝoj: Ne havu maltro da sango inter via alkoholo ĉi-novjare.

Kara koko...

“Kara koko, ekde kiam mi parolas Esperanton, mia familio pensas ke mi estas en sekto. Kiel mi klarigu al ili?” –A.

Kara A., estas konata fakto, ke tiuj vivantaj en sekto kutime ne konscias pri tio. Konsekvence se vi volas, ke via familio ne plu pensu, ke Esperanto estas sekto, vi devos kapti ilin en la movadon. Provu organizi kulturlingvan festivalon en via strato, aŭ koncerton de La Perdita Generacio. Kaj nepre ne prenu ilin al Univerala Kongreso, ĝis ili memstare komencos demandi pri Beletraj Almanokoj.

Ĉu vi havas gravan demandon por Kara Poso? Skribu al kkps.klackunveno@gmail.com!